

La kotizo ne estos repagebla, sendepende de kaŭzo pro kiu oni ne partoprenos.



Valo de rivero Poprad

**105a jubileo de la unua E-klubo en Nowy Sącz**  
**105a datreveno de naskiĝo de la revuo "Pola Esperantisto"**  
**55 jaroj de reaktiviĝo de E-movado en Nowy Sącz**



Nowy Sącz →

# ★ la UNUA BULTENO ★

## La 32-a TUTPOLLANDA ESPERANTO-KONGRESO NOWY SĄCZ 2011

de la 30-a de aprilo ĝis la 7-a de majo 2011  
en NOWY SĄCZ

la temo: **CIVITANA AKTIVECO DE ESPERANTISTOJ**

La venonta TEK okazos en belega montara regiono de Sandecia Beskido, en la centra urbo de la regiono – Nowy Sącz (Nova Sonĉo). Ĝi situas nur 100 km sudoriente de Krakovo kaj najbare ĉe Slovakio. Pro tio ni invitas vin ne nur por kongresa temo, sed ankaŭ al la tre riĉa turisma – landkona programo.

### Programo de la Kongreso:

1. Rolo de esperantistaro en nuna realeco de Pollando kaj Eŭropo. La celo estas trovi la ĝustan lokon por nia movado kaj elpensi manierojn por enplekti ĝin en aliajn similajn, ĝenerale uzeblajn agadojn kaj projektojn sociajn, kulturajn, edukajn – en Pollando kaj en aliaj landoj. Invitataj estas reprezentantoj de eksterlandaj E-organizaĵoj al kreado de la kunlabora reto kaj dum la kongreso - realigado de tiu ĉi celo.

2. Instruado de Esperanto – larĝa diskuto kaj bilanco de la bezonoj, rolo de ILEI kaj PEJ/TEJO, laboro por UTA-oj, sukcesigo de la informado pri lerneblecoj, organizado de E-kursoj. Modelaj lecionoj gvidotaj de la plej bonaj instruistoj/inuoj (Katalin Kovats, Zsafia Korody, Mandrak St.). Seminario por ekzamenpreparo KER kaj la ekzameno.

3. Diskutoj pri Pola Esperantisto pro la rezigno de la nuna redakcia teamo: proponoj de redaktantoj, de teknika prilaboranto, abonkotizoj kaj

presejo. Atendinda estus ankaŭ interparolo pri la formo kaj enhavo de la revuo, proponoj pri ĝia eventuala ŝanĝo.

4. Varia arta kaj amuziga oferto: ĉiutage oni okazigos iun spektaklon aŭ distran aranĝon: folkloraj ensembloj, klasika muziko, teatraĵo, romantika balo, kantado ĉe fajro, 5 diversaj programoj de la ekskursoj...

5. Dum la lasta tago de la Kongreso okazos Ĝenerala Kunsido de Delegitoj de PEA dum kiu oni elektos la novan Estraron de la Asocio.

### Praktikaj informoj:

#### Loĝado laŭ elekto:

modesta, en junulargastejo (50 lokoj) 120 – 160 zlotoj /7 tranoktoj  
meznivela en turismaj hoteloj (80 lokoj) 290 – 370 zlotoj/ 7 tranoktoj  
luxsa en hotelo \*\*\* (50 lokoj) 660 – 840 zlotoj / 7 tranoktoj  
( la elekto validas ĝis elĉerpigo de la kategorioj)



Kongresejo

#### mangeblecoj:

variaj – larĝa oferto de proksimaj baroj, restoracioj kaj aliaj mangejoj kaj manĝprovizo - jam de 12,- zlotoj /tagmanĝo.

#### Ekskursoj pagendaj:

- 1.Laŭ la vojo de ligna arkitekturo
- 2.Valo de Poprad kaj flosado de Piwniczna al Rytro
- 3.Pieniny kaj Tatry
4. Vizito ĉe slovakaj najbaroj – Stara Lubovna (kastelo)

5.Spuroj de judoj en Nowy Sącz kaj Bobowa (sur voje abelujaro Sądecki Bartnik - Stróże)

#### Ekskursoj senpagaj:



Centro de Nowy Sącz

1. Urbovizitado – tagduona (pieda)
2. „Invito al praavoj en kamparo” – tagduona (per biletoj de la urba buso).
3. Vizitado de Stary Sącz (Malnova Sonĉo) - tagduona (per biletoj de **urba buso**)

#### Partoprenkotizoj ĝis la 15-a de decembro:

Poloj - 60 zlotoj por la tuta programo (PEJ-membroj - 30 zlotoj)  
postsocialismaj landoj - 25 eŭroj (gejunuloj ĝis 26 j. - 12 eŭroj)  
ĉiuj ceteraj landoj - 40 eŭroj (gejunuloj ĝis 26 j. - 20 eŭroj)

#### La partoprenkotizo kreskos post la 15-a de decembro:

ĝis la fino de februaro 2011 oni aldonu 20% de la kotizoj  
ĝis la 30a de aprilo 2011 oni aldonu 40% de la kotizoj  
sur loke pagendos aldone 50% de la kotizo